4-a Jaro. N-o 161 APERAS SEMAJNE 3. Novembro 1927.



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanty

SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

PRI HINDIO

La amerika talenta verkistino Katherine Mayo (Mejo), aŭtorino de la libro pri la moroj de la loĝantaro en la Filipina Insularo, okupiĝas en nova libro, titolita **"Patrino Hindio"**, *pri la kutimoj de la hindaj loĝantaroj.*

Ni, konantaj Hindion laŭ la malnova sanskrita literaturo, aŭ laŭ la verkoj de Tagore kaj la fanatika naciismo de Gandi, estas mirigitaj de la rakonto de K. M. pri la moroj de la hinda fanatikeco.

K. M. priskribas al ni kutimojn, ekzistantaj en iu nereala mondo, alilandaĵojn, kiuj ŝajnas kreitaj de iu malsanema imago. Kaj malgraŭ tio, ĉio de ŝi elmontrata ne estas sentimentala literaturaĵo aŭ brodaĵo, sed priskriboj bazitaj sur oficialaj dokumentoj, informoj, statistikoj, sanigistaj raportoj, fragmentoj el debatoj en la hinda parlamento k. c.

Laŭ nia eŭropa spiritostato, havante la senton pri honto pli disvolvita, ni sentas nin ofenditaj de la legaĵo, kiun prezentas al ni la amerika verkistino.

La hinda kulto

Interesa estas la kulto al la kornohavaj bestoj, granda estas la malklereco, en kiu estas tenata la virino, stranga estas la religia fanatikeco de la popolo.


Apartaĵo tre karakteriza pri tiu popolo estas ĝia senlima amo al la multekostaj metaloj. La hindo serĉas monprunton kaj estas preta pagi grandajn procentojn nur se li trovus monon por aĉeti al si orajn kaj arĝentajn ornamaĵojn. Kaj tion li faras el fanatikeco, ĉar li kredas, ke la multekostaj metaloj savas la animon.

La edzeco ĉe la hindoj

La edzeca vivo ĉe la hindoj prezentas senordan miksaĵon de personoj el ambaŭ seksoj.

La hindoj edziĝas inter la 6-a kaj 10-a jaro kaj ne nur formale. Je la 12-a jaro la knabino estas supermatura, kaj se ĝis tiu aĝo ŝi ne edziniĝis, la patro perdas ĉiun estimon en la societo, kaj la medio en kiu li vivas tiel multe lin malestimas, ke lia vivo fariĝas neebla.

Rabindranath Tagore laŭdas tion kaj ĝin klarigas per la fakto, ke tiu ĉi kutimo estas bazita sur alta rasa tradicio. Mayo tamen kritikas akre tiun moralon. Tiuj



Unu el la ĉefstratoj de Kalkuto, kie okazis sangaj malpaciĝoj inter hindoj kaj mohamedanoj.

edziĝoj, ŝi diras, troviĝas en plena kontraŭdiro kun la biologiaj leĝoj. Pro tiu kaŭzo la plimulto el tiuj infanoj-edzinoj difektas siajn intimorganojn kaj plenigas la eŭropajn malsanulejojn. Sed, se la edzo postulas, ke lia edzino revenu hejmen, neniu rajtas kontraŭstari al li, ĉar la leĝoj garantias al li absolutajn rajtojn.

La naskiĝoj

Se iu infano-edzino elportas la edzecan vivon kaj estas fruktigita ĝis sia dekdua jaro, al ŝi oni rigardas kiel al "malpura". Kaj se hazarde iu membro el riĉa kaj nobla familio tuŝis mane tian virinon, tiu perdas sian rangon.

Estas specialaj virinoj, el la plej malaltaj tavoloj de la societo, kiuj servas kiel akuŝistinoj ĉe la naskiĝoj. Tiuj virinoj havas neniajn konojn kaj ricevas la rajton akuŝigi laŭtradicie.

La virino devas akuŝi en malhela neaerumita ĉambro, por ke ne povu eniri la malbona spirito de la novenaskita infano. La intimorganoj de la akuŝantino estas ŝmirataj per brutaj ekskrementoj, kaj la akuŝantino mem trinkas urinon dum la tuta daŭro de la naskoceremonio. Tiu ĉi ceremonio finiĝas ĉe la unua krio de la ido. La akuŝantino restas en tiu religia "atmosfero", ĝis ŝi liberiĝas kaj puriĝas plene, kaj la uzitaj objektoj estas konsiderataj kiel sanktaj kaj gardataj por dua akuŝo.

Kuracado

Preskaŭ la tuta medicina terapeŭtiko ĉe la hindoj konsistas el bestaj restaĵoj (urino k. c.), lakto kaj buterselaktoj. Por vidigi kian gravecon oni donas al tiu "dieca" terapeŭtiko, ni mencios, ke la agonianta hindo devas teni en siaj manoj bovinan voston ĝis lia animo eliros. Lige kun tiu kutimo la amerika verkistino citas la tipan okazon de princo en agonio, kiu submetiĝis al la popola kutimo kaj ĉar estis neeble transporti la bovinon en la supran etaĝon de la palaco, kie kuŝis la princo, oni transportis la liton de la mortanto en la korton, por ke la princo povu elspiri kun la vosto de l' bovino en mano.

Ĉiu vundo estas kuracata per homa urino aŭ brutaj ekskrementoj. Pri tiu empiria medicino Rabindranath Tagore, kiu trovas la savon de Okcidento en ĝia asimiliĝo kun Oriento, diras, ke ĝi estas la plej supera penso de la etiko. Mahatma Gandi, kiu volas revoluciigi la tutan spiritostaton de la hinda fanatikeco kaj kiu estas decida kontraŭulo de Tagore,

okaze de iu malsano de la okuloj, postulis de la kuracisto lin operacii laŭ la metodoj de la eŭropa scienco. La kuracisto, por ne fali en konflikton kun la kutimoj kaj leĝoj de la hindoj, konsentis, sed kondiĉe, ke Gandi deklaros skribe antaŭ atestantoj, ke li persone prenas la respondecon pri la operacio.

Aliaj kutimoj

La bovino, la bovoviro kaj la bovido estas konsiderataj kiel bestoj portantaj feliĉon kaj ne estas permesite ilin mortigi. Ili marŝas libere ĉien, eĉ sur la ĉefstratoj de la grandaj urboj, tial ili fariĝis tiel multnombraj, ke ne plu sufiĉas al ili la kampoj kaj paŝtejoj. Per tio estas klarigata ankaŭ ilia degenero. Pro tio ankaŭ la loĝantaro nutras sin tiel simple.

Ĉiu reformo, kiun la anglaj estraroj volas enkonduki, renkontas la kontraŭstaron de la plej furioza religia fanatikeco.

Kvankam ne estas permesite buĉi bovinojn, bovovirojn kaj bovidojn, ĉiujare estas ŝiregataj milionoj da vivaj bovidoj, ĉar tiumaniere iliaj feloj estus pli bonkvalitaj. Tiuj bestoj ne estas buĉataj, sed milionoj da ili mortas pro malsato kaj soifo kaj fariĝas viktimoj al rabobirdoj.

La angla gazetaro ne refutas tiujn faktojn, kiuj ŝajnas fantaziaj, ĉar ili estas bazitaj sur oficialaj aktoj.

Katherine Mayo diras, ke la fanatikeco de la hindoj povas esti forigita nur per la lernejo. Sed por klerigi tiun popolon oni devas malfermi lernejojn en 500 000 vilaĝoj. Tio povas okazi nur en la daŭro de kelkaj generacioj.

La hinda virino ne povas okupiĝi pri alio ol pri la familia hejmo. Kiel virino ŝi estas ĉiam je la dispono de la viro. La leĝo ŝin devigas, kiam ŝi edziniĝos, esti en intima proksimo de sia edzo tri fojojn tage. En mala okazo, la leĝo disponigas al la viro punrimedojn.

Trad.: *I. H. K.*

EL USONO

Jen kiamaniere skribis en gazeto "Boston Transcript" glora patrioto, tipo de la vere amerika spirito kaj konscienco de ruĝsanga dupugna "centprocentulo":

"La prokrasto de la juĝitoj devus esti plilongigota ĝis la 1-a de novembro, nome, ĝis kiam la rikolta laboro sur la kamparo estos farita. Mallonge antaŭe tiu dato la estroj de ĉiuj ŝtatoj invitu ĉiujn ruĝsangajn amerikanojn veni al Boston je granda kunveno. Tio ĉi plenigus la urbon en la ekzekutotago je viroj el Mississippi kaj Texas. Oni enĵurigu 25 000 el ĉi-tiuj venantoj el la sudo kiel specialpolicistojn. *Kiam ankoraŭ ruĝulo montras sian kapon ie, tiam ili mortpafu lin kaj ĵetu* lian kadavron en la Charles-riveron. La skribanto de ĉi-linioj neniam vizitis la Nov-Anglionhejmujon de siaj prapatroj, sed li ja estus preta al tia vizito kune kun multaj miloj da sudanoj de norda deveno, kiuj nur atendegas la okazon."

Tro vera, laŭvorte! Ili nur atendis la okazon por buĉadi kaj batali inter Laboristaro, kiel ili ankoraŭ tion faras inter la koloraj "kunŝtatanoj". Sed la ŝtatestra mortigemulo sciis, kion la hipokrita sinjora klaso plej multe timadas, nome, ke Ameriko perdadas eron post ero el la glora nimbo de justeco por ĉiuj, perdas la maskon de demokratio, bonkonduto, civilizacio kaj kulturo antaŭ la pli malnova kulturmondo — Eŭropo. Tial Sacco kaj Vanzetti devis esti mortigitaj laŭleĝe. Ke laŭleĝeco estas plej malofte ne justeco kaj neniam justeco inter la du klasoj, laborista — kapitalista, pri tio oni ankoraŭ tro prave esperas, povi trompi la plimulton el la Proletaro. Multegaj ne plu estas trompeblaj. Ni arde, senlace senmaskigadu la verajn mortigemulojn.

Persekutado de protestintoj pri Sacco kaj Vanzetti komencas.

Ĉar, inter aliaj aferoj, li esprimis preferon por la "regado de la laborista klaso", Rudolf Gole estas retenata de la enmigrado-estraro por ebla punekzilo al Aŭstrio. Gole estis arestata pro leteroj, kiujn li sendis al Guberniestro Fuller kaj en kiuj li demandis justecon por Sacco kaj Vanzetti. La kapitalista gazetaro sciis raporti, ke li sendis minacleterojn. Li estis puŝe transportata al malliberejo kaj tenata tie kiel federacia kaptito, *sen komunikado*. Laŭ la polico, Gole deklaris, ke li estis membro de la Aŭstria Komunista Partio dum 1919.

Liaj aresto kaj malliberigo estas unu el la neelĉerpebla rimedaro timegigi enmigritajn laboristojn, por ke ili memvole subiĝu al ekspluatado kaj ne partoprenu kiel ajn en la politika, socia vivo de Usono. *(1307.)*

Internaciaj sindikataj Problemoj

En la organo de la Germana Metallaborista Asocio "Metallarbeiter-Zeitung" (Metallaborista Gazeto) aperis artikolo kun la supra titolo. Ĝin verkis Fritz Kummer, redaktoro de la dirita gazeto. Ĉar ĝi ankaŭ tuŝas la okazintaĵojn kaj diskutadojn de la kongreso de la Sind. Intern., okazinta en Parizo, ni donas en esp-a traduko parton de ĉi-artikolo, kie estas pritraktata la lingva afero kaj kie la verkinto mem kelkafoje kontraŭdiris sin. Lastfoje oni venas al la konkludo, ke oni ne povas forigi la interkompreniĝajn malfacilaĵojn ĝis ne estas aplikata unueclingvo kiel kongreslingvo.

A. S.

En Parizo plian fojon frapis en la okulojn la malnova baro de la interkompreniĝo, la granda malfacilaĵo, konservi la opiniajn variojn antaŭ la lingva diverseco. Se ĉi malbonaĵo ne ekzistus kaj se konsiderinda parto de la kongresreprezentantoj scipovus du aŭ pliajn lingvojn, estus malaperintaj multaj malagrablaĵoj kaj kontrastoj. Propono de la nederlandaj kolegoj celis forigi ĉi malbonaĵon. Ĝi postulas, enkonduki la uzadon de helplingvo por la internaciaj diskutadoj. Tia propono devus esti farita flanke de la germana delegitaro. Ne nur, ĉar ĉe ĝi internacia pensmaniero estas korafero, sed ankaŭ, ĉar tiel spirite, organize kaj laŭnombre alta movado havas la devon, esti malproksimvida. La germana delegitaro dume ne povis konsenti al la propono de la nederlandaj kolegoj. Domaĝe! Je ĝia efektivigo oni certe ne povas dubi. Ju pli serioze oni agas, des pli bone estas. La celado al internacia interkompreniĝo pro tio restas kondamnita, resti mizera partverko ĝis ebliĝos pli bona kaj ĝenerale persona interkompreniĝo. De la sindikataj gvidantoj, kiuj estas ĝojaj, se ilia taga laboro ne pliiĝos je dufoje 8 horojn, nature neniu postulos, ke ili lernu fremdan lingvon aŭ esperanto'n. Sed la sindikataj estraroj povas forigi ĉi malbonaĵon per tio, ke ili sciigu ĉe la dungo de la oficistoj, ke tiu estas preferata, kiu posedas fremdan lingvon. Jam la nura fakto, ke estas dezirata la scio de fremda lingvo, kio ankaŭ aprobe akcelas la progreson, destinos en ĉiuj sindikatoj vicon da kolegoj, kiuj dediĉos sin al la lingva studado. Kaj se tiam ankoraŭ estos interŝanĝataj la lingvoscipovantoj, post la dungo kun ekvivalenta kolego de la frata asocio de lando, kies lingvon ili scipovas, baldaŭ ĉiuj sindikatoj havos aron da lingvospertaj kolegoj, sen multe da peno kaj mono. Kaj per la scio de la lingvo de alia lando, la kolegoj alportos la ŝlosilon al la kesto de la anima, spirita kaj alia propreco de alia popolo. Se tio okazos, tiam oni nur povos paroli pri internacia interkompreniĝo. Kion oni ĝisnune esprimis, estis nur provo, kiu eĉ ne unu foje sukcesis. Jam estis aludate, ke la germanaj sindikatoj komencu la edukadon de lingvospertaj kolegoj. La aliaj jam sekvos.

Elgermanigis *Aug. Scheel (1919)*.

Proverbaro Esperanta

laŭ la verko "Frazeologio rusa-pola-franca-germana" de *M. F. Zamenhof*, aranĝis *L. L. Zamenhof*.

Unu volumo in-8, 82-paĝa

Prezo: 1,50 mk. g.

Adm. de SAT.

Hungaria Proletaro funebras

Heroa soldato de la Revolucio mortis

Malesperiga famo flugis lunde, la 10-an de oktobro, tra Budapeŝto, de fabriko al fabriko, de domo al domo kaj ĉie, kie laboris proletoj, ekhaltis la laboro, ĉesis funkcii la maŝinoj kaj okuloj malheliĝintaj pro larmoj rigardis la anoncanton de la terura novaĵo:

Mortis K-do Ŝtromfeld...

Kaj ĉiuj K-doj, sen partia diferenco, konsentis, ke la sortbato, kiu trafis la hungarian Laboristaron per la morto de Aŭrelo Ŝtromfeld, estas nemezurebla.

Kian rolon li havis en la laborista movado? Kiu li estis, ke lia morto tiel ektremigis la laboristajn korojn?

Jen lia vivo:

Li ne naskiĝis en proletloĝejo, lin igis esti socialisto ne lia klasa situacio — li devenis el burĝa familio — sed lia prudento kaj granda amo al laboruloj. En la jaro 1878 li naskiĝis kaj kiam li atingis sian dekkvaran jaron, la gepatroj sendis lin en oficirlernejon. Fininte la studojn en ĉi lernejo, li iĝis oficiro en la aŭstra-hungara armeo. Lia diligento, inteligento kaj neordinara organiza kapablo ne evitis la atenton de la estroj kaj en sia 33-a jaro li estis jam majoro kaj profesoro de la "Ludovika Akademio" (lernejo por eduki oficirojn).

Venis la mondmilito. Ŝtromfeld, kiel staba vickolonelo, finrigardis la teruaĵojn de la hombuĉado. *Tie naskiĝis lia firma kredo kaj konvinkiĝo, ke devas veni alia sociordo por savi la suferantan homaron*... Kaj en la revolucio eksplodinta post la mondmilito li jam eklaboris aktive por la Proletaro, por la kreado de nova sociordo: *li iĝis stabestro de la hungara ruĝa armeo.* Verŝajne estas inter la legantoj, kiuj ne forgesis, ke en Hungario okazis en 1919 proleta Revolucio kaj ke la ruĝa armeo hungara tre bonsukcese batalis kontraŭ la blanka armeo de la ĉeĥoslovaka imperialismo. Ĉi bonajn rezultojn ni povas atribui ĉefe al la brilaj organizaj kapabloj de K-do Ŝtromfeld, kiu entuziasme, per sia tuta energio laboris por la venko de la Revolucio.

Sed venis la falo. La juna proleta ŝtato hungara ne povis elteni la koncentritan atakon de la rumanaj imperialismaj armeoj, kiuj iris helpi siajn ĉeĥajn kolegojn; la Revolucio mortis kaj Hungario estiĝis la plej terura lando por laboristoj. Ankaŭ Ŝtromfeld estis arestata kaj kondamnata je 3-jara mallibereja puno. La kaŭzo de ĉi tiu relative sufiĉe milda verdikto estas tio, ke ankaŭ la naciistoj devis konfesi, ke li sukcesplene batalis kontraŭ la ĉeĥaj kaj rumanaj bandoj. Ili ĉi agon konsideris tiel, ke Ŝtromfeld batalis kontraŭ la malamikoj de la *patrio,* kvankam ververe *li nur luktis por la proleta ŝtato hungara.*

Post unu kaj duonjara mallibereco li ricevis amnestion kaj de tiam sian tutan tempon li oferis por la laborista movado. Jam en 1918 li aliĝis al la socialdemokrata partio, kaj post la liberiĝo, li partoprenis la partian movadon, sed aktive li laboris ankaŭ en la Asocio de Naturamikoj, en la Sindikato de Privatoficistoj (li fariĝis privatoficisto) kaj en la Hungaria



Aŭrelo Ŝtromfeld

Infanamika Societo Laborista. Li estis ano de la Asocio de Laboristaj Alkoholkontraŭuloj.

En la jaro 1923 denove oni arestis lin, sed post kelkaj monatoj li liberiĝis, ĉar nenimaniere la blankuloj povis trovi pretekston por lin kondamni.

Ankaŭ ĉi tiu okazintaĵo ne forprenis lian energion, laboremon kaj per duobligitaj fortoj li laboris en la movado. *En la nuna jaro li aliĝis al la Hungaria Esperantista Societo Laborista kaj la 49-jara homo komencis lerni nian lingvon*...

Antaŭ du semajnoj li diris al ni en la partio:

— Oni diras, ke mi estas mensmalsana, ĉar mi kuras ĉiuvespere de loko al loko, ĉar mi laboras seninterrompe en la movado socialista... Sed tamen mi nur tion diras: *Ĉion, ĉion por la movado*...

Kaj kiu konis lian grandegan, fortan staturon, lian sanan organismon, tiu preskaŭ ne kredis, ke tia homo povis morti. *Li mortis pro la movado*... De tempo al tempo doloris al li la gorĝo, sed anstataŭ iri al kuracisto, li iris al diversaj lokoj por lekcii, paroladi, organizi, labori. La 7-an, vendrede, denove komencis dolori lia gorĝo, sed li ne atentante tion, iris, kiel kutime, en iun laboristan hejmon por lekcii. Sabate jam tiel malboniĝis lia stato, ke li devis iri en malsanulejon. La kuracisto konstatis difterion. Kaj dimanĉe nokte, je la 2-a h. K-do Ŝtromfeld ekdormis por ĉiam...

La enterigon partoprenis pli ol 20 000 K-doj. La granda amaso kortuŝite staris ĉirkaŭ la tombo kaj priploris la iaman estron de la ruĝarmeo, kuraĝegan gvidinton de la revolucia movado en la blanka Hungario ... *Li estis la Espero de la malmultnombraj, revolucie pensantaj socialistoj kaj ĝuste li devis morti!*...

(8740).



La burĝaro elspezas milionojn por sia gazetaro, ĉar ĝi komprenas ĝian signifon. Se la laboristoj ne povas kolekti tiom da mono, ili almenaŭ pruvu, ke ankaŭ ili konscias la signifon de sia gazetaro, abonante kaj abonigante la "Sennaciulon".

Laborista Radio-amatora movado en Nederlando

Ekzistas en Nederlando Unuiĝo de Laboristaj Radio-amatoroj.

Ĝi celas: veki ĉe la laboristoj intereson por la Radio-, telefon- kaj telegrafio, havigi agrablan kaj utilan okupon per Radio-, telefon- kaj telegrafio al siaj membroj, disvastigi per Radio la principojn de la Nederlanda laborista movado, organizita en la Nederlanda Socialdemokrata Laborista Partio kaj la Nederlanda Sindikata Asocio.

Ĝi klopodas atingi sian celon per: elsendo de paroladoj, lekcioj, debatoj, koncertoj ktp., organizo de aŭdado de ĉi tiuj elsendaĵoj de kiel eble plej granda nombro da personoj, havigo de aparatoj ktp. al siaj membroj je malmultekosta kaj facila maniero, donado de radioteknikaj informoj al siaj membroj, klopodado por akiro de propra sendilo.

La Unuiĝo elsendas unufoje en ĉiu semajno, sabatvespere je la 8-a h., propran programon per la Stacio Hilversum (ondo 1050). Ĝi konsistas ĝenerale el: parolado, muziko, kantado, deklamado. Oni ankaŭ jam foje disaŭdigis teatraĵon.

La unuiĝo havas jam preskaŭ 2000 membrojn: La kotizaĵo estas 1 guldeno jare; por tiuj, kiuj posedas aparaton, 2½ guldenoj. La Socialdemokrata Laborista Partio kaj la Nederlanda Sindikata Asocio donas subvencion al la Unuiĝo. Okazas ankaŭ, ke ia tutlanda Sindikato aranĝas kaj pagas la programon por unu vespero.

Kiel organo de la Unuiĝo aperas ĉiusemajna gazeto "Radio".

La Unuiĝo havas socialdemokratan karakteron. Ekzistas ankaŭ neŭtrala, katolika kaj kristana Radio-organizoj (nelaboristaj).

670 (Enschede).

PLU PRI SUDA AFRIKO

Leginte en n-o 155 la artikolon de mia malnova amiko W. H. Andrews (elp. Andruz) pri *Laboristaj Kondiĉoj en Suda Afriko,* mi decidis sendi ĝin kun peto por intervjuo al Clements Kadalie (elp. Klemenc Kadali), sekretario de la Industria kaj Komerca Laborista Unuiĝo — la fama kolorula sindikato, nun parto de la Amsterdama Internacio, kiu timigis la mastrojn kaj multajn blankulojn en Suda Afriko.

Kadalie, bone kaj taŭge vestita, staras alte. Vivplena nigra vizaĝo kaj alta frunto atestas la energion kaj la inteligentecon. Li simbolas la leviĝon de subpremata raso. Li parolis pri vojaĝo kaj kunvenoj en Francio, Britio, Aŭstrio ktp. Ĉie la laboristoj interesiĝas pri la vekiĝo de la nigra laboristo. Kvankam pro la nova leĝo li atendas areston, kiam li vojaĝos hejmen, ŝajnas, ke li eĉ ne dubetas pri la fina organiziĝo kaj venko de la laboristoj.

Ĉu la barilo de lingva diverseco malhelpas lin? Ĉehejme jes, ĉar la sindikata ĵurnalo devas presiĝi kvarlingve. Krom malŝparo de tempo kaj energio en kunvenoj mem per traduko, li persone ne povis legi poste la proponojn alprenitajn en la germana raporto.

Ĉu li aŭdis pri la internacia lingvo? Jes, kaj en Aŭstrio K-doj promesis sendi al li propagandfolietojn. Certe li volas sukceson de la atako kontraŭ la gravaj lingvaj bariloj, kiuj nun malhelpas la solidarecon kaj komprenon inter tutmondaj proletoj.

Plejparte li konsentis kun la artikolo de K-do Andrews, kies kuraĝon kaj estrecon li longtempe konis kaj admiris. Sed, laŭ lia opinio, K-do Andrews trograndigis la helpon donitan de la KP-anoj en la organizado de la nigruloj. Tre malgranda partio el ne pli ol 300 anoj, eĉ



se ĉiu el ili laborus, ne povas organizi la 100 000 en la ICU. Sed la KP-anoj mem suferas pro sia rasa antaŭjuĝo kaj verŝajne nur malmultaj anoj helpis post la komenco de la afero. Ĉu la atako de la registaro ne pruvas, ke la ICU ne estas reakcia, sed progresema? Certe paroli pri ĝenerala striko pro altigo de salajro estus sinmortiga nuntempe. La registaro serĉas bastonon kaj se la ICU amike rilatus kun la KP, la jam fortaj rasoj kaj klasaj malamoj uzus la alarmkrion "Subaĉetita de Moskvo" por tute detrui la sindikaton.

Eble la reakcio konsentas enmeti poste detalojn pri la funkcio de la reakcia leĝo kaj la evoluo de la organizado de la koloruloj. Kadali mem ŝatos ricevi informon pri kursoj por sindikatanoj aŭ salutojn de alilandaj sindikatoj. Sendu al: 16 Market, *St. Johannesburg, S. Africa,* por montri, ke SAT-anoj estas *senrasecaj.* *(488.)*



Faktoj kaj komentoj

Stacidoma Radioaparato

Praktika novenkonduko estas farita de la fervojistaro en la stacidomo York (Anglio) helpe de la Radio. Speciala Radio-aparato en la stacidomo mem komunikas la for- kaj alveturon de la vagonaroj, samkiel ĉiujn aliajn necesajn informojn al la publiko kaj la fervojistoj. La vortoj estas tiel klare aŭdeblaj, ke oni povas ilin kompreni de la unu ĝis la alia ekstremo de la grandega stacidomo.

Jen denove kiel rapide kaj neimageble progresegas la tekniko.

"Surgenue por Hindenburg!"

Okaze de la solena festado de la 80-jara jubileo de l' germana Regno-Prezidanto Hindenburg, la burĝa gazetaro vet-

---

Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo

(Daŭrigo kvara)

"La totemismo ne estas religio, kiun konsistigas ĉu bestoj, ĉu homoj, ĉu figuroj, sed ia sennoma, nepersona forto, ekzistanta en ĉiuj klananoj, ne aparte kuniĝante tamen kun iu el ili. Neniu posedas entute tiun forton, sed ĉiuj partoprenas ĝin. Ĝi estas tiel sendependa de la apartaj klananoj, en kiuj ĝi enkorpiĝas, ke ĝi antaŭ- kaj postvivas ilin." (Durkheim.)

La aŭstraliano ne kapablas prezenti al si tiun forton, sed la melaneziano kaj amerika hindo jam havas ideon pri tiu komuna forto, disa en ĉiuj estuloj, ligitaj per totema parenceco. Ili donas al ĝi diversajn nomojn, el kiuj la plej konata estas *mana*-o. Ĉe la antikvaj egiptoj tiu sama forto estis nomata *ka*-o.

"La *mana-o* ne nur estas ia forto, ia estaĵo, sed plie ĝi estas eco kaj stato. Alivorte, la termino estas samtempe substantiva, adjektiva kaj verba ... La *mana*-o estas ĝuste tio, kio faras la valoron de la aĵoj kaj individuoj; ĝi estas la magia religio kaj eĉ socia valoro ... Oni eĉ povas plilarĝigi ĝian sencon kaj diri, ke la *mana*-o estas la forto en ĝia plej alta grado, la vera efikeco de la aĵoj, kiu pligrandigas ilian mekanikan agadon, ne detruante ĝin. La *mana*-o kaŭzas, ke la fiŝreto kaptas, ke la domo estas fortika, ke la boato bone naĝas. En la kampo ĝi estas la fruktodoneco, en la kuraciloj la eco, kiu kuracas aŭ mortigas. En la sago ĝi estas tio, kio mortigas[8])."

La *mana*-o estas la esenco mem, la potenco kaj suvereneco de la klano. Tiu anonima forto, nepersona kaj disa estas la pratipo el tio, kion ĉiuj religioj konsideras kiel sanktan kaj individuigas kiel dion; ĝi estas nenio alia ol la kolektiva potenco, ĝi sekve konsistigas la socian estaĵon de la primitiva klano, reprezentita sub la formo de totemo.

En alia ĉapitro mi citos kaj diskutos diversajn difinojn de la vorto "patrio". Tamen jam nun estas interese tuj kompari la difinon de Brunetière (Brüntier, 1849—1907), sufiĉe fama profesoro kaj kritikisto franca, direktoro de la grava *Revuo de la du Mondoj* kaj tre aŭtoritata reprezentanto de la patriotisma ideologio. Per tiu komparo oni ekvidos, ke la moderna kompreno pri patriotismo tre parencas la totemismon de la sovaĝuloj.

[8]) *Hubert* kaj *Mauss.* Ĝenerala teorio pri magio.

"... la ideo pri patrio havas unue *naturan* fundamenton ... ĝi havas tradician bazon, *historian fundamenton;* ĝi havas fine, kaj ni kuraĝu tion diri, *mistikan fundamenton* ... tiu tiom forta ligilo, kiu ligas unuj al la aliaj ĉiujn infanojn el la sama grundo, ĝi ne estas la intereso, nek la cirkonstancoj, kiuj kreis ĝin, ĝi ne estas la kutimo, ĝi estas la instinkto; kaj kio estas la instinkto, se ne la atesto aŭ la pruvo pri io alia ol ni, kio vivas kaj kio agas en ni[9])."

Tiu "io alia", kiu vivas kaj agas ĉe ĉiu nuntempa patrioto, estas sendube tio, kion la "sovaĝuloj" nomas *mana*-o.

La pure totema organizformo ekzistas nur tiom longe, kiom la klanoj estas nomadaj. Kiam ili fiksiĝas sur iu loko, tiam ili aliiĝas. La loka komuna vivmaniero kreas kutimojn, kiuj fariĝas sociaj instinktoj. La ligiloj el totema, mistika komuniiĝo ne plu estas tiom necesaj por firmigi la sociemon. Kiam la klanoj vagadis de iu loko al alia, ili povis posedi nur kelkajn aĵojn kaj ilojn. Pro tio sendube leĝoj kaj estroj ne estis necesaj. Sed kiam ekzistas teritoriaj grupiĝoj (vilaĝoj), la kondiĉoj fariĝis malsamaj. Estas tiam eble amasigi kaj gardi diversajn objektojn kaj vivnecesaĵojn. Oni plie

[9]) Probatatalaj Paroladoj.

batalis donante laŭdartikolojn pri la unua germana ŝtatisto.

Plej detale estis priskribata ia grandioza parado kun ceremonia veksignalo, je kiu "la tuta oficiala Germanio, de la kanceliero Marks ĝis la generalaro de la malnova armeo", aperis "kun ĉiuj siaj emblemoj kaj en plej brilantaj uniformoj"... Lumigiloj kaptis la vizaĝon de Hindenburg el ĉiuj flankoj per potencaj lumradioj. La roto kun la standardoj salutis la marŝalon per ceremonia marŝo sub la sonoj de la dek orkestroj kaj sub la mistika (?) lumo de la miloj da torĉoj . . .

Sed — aŭskultu! — en la sama tempo krioj meze de la popolamaso (!): "Surgenue por Hindenburg!" kiel elektra fluo (?) trapasis la centmilojn da rigardantoj, ĉiuj senĉapeligis sin kaj falis surgenue, en la daŭro de dek minutoj kantante "Deutschland, Deutschland über alles" (Germanio super ĉio).

"Tia komuna popola (!) festo — ĝemas iu raportanto, — ne estis vidata de post la tagoj jam antaŭ la milito."

Ceremoniaj marŝoj, ŝovinistaj ĵuroj, "Germanio super ĉio" — kiel ĉio ĉi rememorigas, efektive, "la tagojn jam antaŭ la milito", kiu malgraŭ ĉio kondukis Germanio ĝis... la Dawes-a (Daŭs) reparacia plano.

Ŝajnas, ke ankaŭ tio ne prudentigis la germanajn militemulojn.

Germanio de Ŝiller, de Heine, de Karl Marks, de Bebel kaj de Libknecht, kie vi estas?!

TAGO EL MIA VIVO

Mi estas 37-jara, edziĝinta, laŭ profesio fervoja lignaĵisto, eksterpartia, ateisto, laboras en fervojkruca stacio Vezgulbene.

Mi ellitiĝas je la 6-a h., iom matenmanĝas kaj fajfilo je la 6,30-a h. jam vokas al laborejo. La laborejo estas je ĉirkaŭ triono da kilometro de la loĝejo; la laborejo similas al garbejo kun ordinara tegmento kaj tabula barmuro, fera forneto, kiun ĉiudekminute oni vintre devas hejti. Malseka polvoplena planko sur tero, post la barmuro estas forĝejo. Bolakvo por trinki ne estas.

La laboro komenciĝas je la 7-a h., tagmanĝ-interrompo 1 h., multaj iras hejmen, nur kelkaj tagmanĝas en la laborejo kunportitan tagmanĝon. La laboroj finiĝas je la 16-a h. kaj ĉiuj iras hejmen, kelkaj eĉ 3—5 km. malproksimen. La loĝejoj de fervojistoj estas unuĉambraj, escepte flavuloj[1]). Dome mi lavas min, vespermanĝas, post tio legas Sennaciulon, Senn. Revuon, aŭ Liberpensulon, korespondadas, kaj enlitiĝas je la 22-a h.

Sabate finiĝas la laboroj je la 13-a h.; post tagmanĝo mi iras al la profesiunuiĝo, kotizas, ricevas literaturaĵon kaj interparolas kun Gek-doj kaj agitas pri esp-o. Esp-o-grupo ĉi tie ne ekzistas, mi estas la sola esp-isto.

Dimanĉe mi legas SAT-librojn, korespondadas kaj ripozpromenas, vizitas kinon, teatron. Ĉiuj fervojistoj havas 14-tagan libertempon kaj du veturbiletojn senpage. El la malbonaĵoj notinda estas tiu, ke la monatsalajrulojn la fervoja direkcio tiel nesufiĉe kuracas, kvankam senpage, ke fervojistoj tre ofte devas elekti morton aŭ kuraci sin private je propraj elspezoj. Tiel okazis kun mi. Mi malvarmumis kaj ekmalsanis, elspezis private iom pli ol dumonatan salajron, sed civitanoj forrabis dum 8-jara regado[2]) sume dumonatajn salajrojn de ĉiuj oficistoj en Latvio.

(7714) — Latvio.

1) Regantaj fervojistoj.



Kun risko de morto

(Skandalo dum kongreso)

Ĉiuj bone scias, kiel laboras komjunuloj en ĉiuj, precipe en blankaj landoj. Tre proksime de ni, en Okcidenta Blankrusio, antaŭ nelonge okazis jeno: Iun belan tagon urbo Belostok estis "feliĉigita" per enveturo de grandaj personoj: ministroj, kuracistoj, scienculoj k. a. el ĉiuj eksterlandaj regnoj. Ĉiuj ili prezentis XIX-an Universalan Kongreson de Esperantistoj.

Dum la kunsidoj de la kongreso, loka komitato de Kompartio de Okcidenta Blankrusio ekdeziris montri al la gastoj, ke kvankam en Polio regas severa teroro, tamen komunistoj sian laboron ne forgesas kaj daŭrigas ĝin, ĉiam estante pretaj por batalo. Por ĉi celo estas presitaj nelaŭleĝaj flugfolioj, disdonotaj al la delegitoj de la kongreso. Komisii ĉi laboron oni devis al komjunuloj. La po-

2) Laŭ sciigoj de profunuiĝa ĵurnalo.

---

komencas iomete kulturi la teron. Ĉe tia stadio la propraĵo estas ankoraŭ komuna.

Sed ne ĉiuj klanoj fiksiĝis samtempe. Kelkaj vivas ankoraŭ nomade kaj iafoje minacas la posedaĵojn de la vilaĝoj. Necesas do por ĉi tiuj lastaj sin ŝirmi kaj defendi. Tiucele okazas kuniĝo de vilaĝoj en pli vastajn unuojn, kiujn oni nomas fratrioj. Ĉi tiuj lastaj ankaŭ kuniĝas kaj formas tribojn. Tiam aperas estroj.

Estas tre interese esplori, kiamaniere individuoj akiris la estrecon. Ni jam vidis, ke en la unua stadio de la klano la *mana*-o estas ia disa, nepersona forto, kiun ĉiuj klananoj posedas komune, nedividite. Tiu forto devenas de la totemo komuna al ĉiuj klananoj. Sekve la individua estreco povas deveni nur el la totemo de la klano. Kiel tio okazis? Kiel tiu komuna, disa, nedividebla *mana*-o povis, post diversaj aliformiĝoj, koncentriĝi en unu solan individuon?

La scienculoj ne liveras tute klarajn kaj senmankajn respondojn al tiuj demandoj. La mitologo Frazer asertas, ke la unuaj estroj estis magiistoj, sorĉistoj. Spencer, Gillen, Durkheim opinias, ke ili estis iaj pastroj, aŭ simple gardistoj de la sanktaj objektoj. Ĉe la aŭstraliaj indiĝenoj oni trovas individuojn, nomitajn *alatunjoj,* kiuj ŝajnas ludi ian estran rolon: "La estreco de *alatunjo,* diras Spencer kaj Gillen, estas tre nepreciza. Li ne havas difinitan povon sur la grupanojn. Li kunvokas la maljunulojn, kiujn oni ĉiam konsultas pri gravaj aferoj, ekzemple pri plenumado de sanktaj ceremonioj, pri puno al la individuoj, kiuj malobeis la triban kutimon; kaj lia opinio entenas ekzakte la pezon, kiun donas al li lia reputacio... Li ne estas nepre konsiderata kiel la plej grava ano de la konsilantaro; lia opinio ne estas leĝdona; nur se li estas maljuna kaj sperta li povas havi grandan influon."

La *alatunjoj* havas kiel ĉefan mision gardi la sanktejon, kiu ĝenerale troviĝas en iu fendaĵo de ŝtonego aŭ en iu kavo. Tiun sanktejon ja ne devas eniri profanulo. Tie kuŝas la simbolaj relikvoj (sanktrestaĵoj), kiuj, supozate, entenas la animon kaj la korpon de la praŭloj. Ĉi-okaze, kiel ĉie inter la primitivuloj, la granda mastro estas la kutimo, la kolektiva kaj hereda kutimo, kies nur obeemaj servistoj estas la individuoj havantaj ian aŭtoritaton.

"Fatale okazis, ke kunvenigante periode la klanon, por plenumi la kutimajn kaj devigajn ritojn, kaj kuniĝante kun la *alatunjoj* de la najbaraj klanoj, kiuj siaflanke kaj samcele okazigis saman kunvenon, tiuj "estroj" tiel kunvenintaj interkonsiliĝis, estis influataj de tiuj, kiuj sciis sin trudi, parolis kun ili pri ŝanĝoj farindaj kaj tiel naskiĝis kaj enradikiĝis la unuaj kutimoj el personaj iniciativo kaj estreco. Kuŝas tie provo, unue skizita sur la rita kampo, pri parlamenta kaj federacia regado, plenumita de la kunvenantaro el la lokaj estroj, agantaj kiel ritaj estroj en tribaj ceremonioj, kies trafpovo transiras la limojn de la klano, ĉar temas pri tribaj ceremonioj[10])."

Treege malrapide elmontriĝas ia vera estreco. Unue ĝi estas nur religieca kaj neniel politikeca. Vera estreco aperos nur kiam ĝi trovos ekonomian bazon, kiel okazis, ekzemple, ĉe la indiĝenoj el Norda Ameriko, kies estro estas ariganto de posedaĵoj kaj provizumanto de nutraĵoj.

Por ke fariĝu ebla la individuiĝo de la estreco, necesis, ke aliiĝu la totemismo. La mitologio instruas, ke la ideo pri persona dio ne troviĝas ĉe la komenco, sed estas la rezulto de sufiĉe longa proceso. La individuiĝo de la dioj kaj la individuiĝo de la estreco okazis samtempe kaj paralele.

(Pluo sekvos). *E. Lanty.*

10) *A. Moret* kaj *G. Davy.*

lico iamaniere eksciis pri la flugfolioj kaj gardis la korton, kie okazis kunvenoj de la kongreso, por ke neniu venu kaj por ke la flugfolioj ne trafu manon de kongresanoj. Sed komjunuloj nerimarkite envenis trans barilon, dum unu minuto disdonis la flugfoliojn kaj samvoje malaperis.

Post la konatiĝo kun la enhavo de l' folioj, la delegitoj iom panikis. La policanoj estis tre mirigataj pro ĉi okazo. Ili komencis serĉi "krimulojn", sed vane, — la polico sukcesis aresti neniun. Komjunuloj kun risko de morto aŭ senlima malliberigo plenumis sian devon.

Estas tre karakteriza, ke la gazetaro eĉ ne unu vorton diris pri ĉi tiu okazo! . . . Kial do? Eĉ nepolitika "Heroldo de Esperanto" nenian vorteton raportis pri ĉi okazo.

Dim. Snejko-Minsk.

(Laŭ letero ricevita el Belostok al Redakcio de Blankrusia komjunula gazeto "Ruĝa Anstataŭanto".)

MIA BUĜETO

Kun granda intereso mi legis la artikolon "Mia buĝeto" de l' angla K-do kaj plezure mi donas ĉi-sube ankaŭ tute malkaŝe miajn ciferojn pri la jaro 1926, por montri kiel vivas svisa poŝtoficisto. Mi estas 34-jara, edziĝinta de post 6 jaroj kaj havas du filinetojn. Mia tuta havaĵo kaj enspezo konsistas nur el la salajro. Mia edzino ne povas gajni, ĉar prizorgante sola ĉion en la loĝejo kaj ambaŭ infanojn, ŝi sufiĉe streĉe devas labori. La nunjara buĝeto aspektus iom pli bele ol la ĉisuba, ĉar de aŭgusto mi gajnas monate fr. 574.20, lastjare fr. 517.50. Mi laboras 48 horojn semajne kaj rajtas ĉiujare ĝui trisemajnan libertempon jenmaniere: La unuan jaron mi devas ĝui la libertempon dum la unua kvaronjaro, la sekvantan jaron dum la tria, la postsekvantan jaron dum la kvara, kaj la kvaran dum la dua kvaronjaro, kaj ree same. Tiuj ĉi laborkondiĉoj, kvankam ne ankoraŭ idealaj, tamen kaŭzas maltrankvilan dormon al nialanda reakciularo. Jen la ciferoj:

Enspezoj:

	sv. fr.
Mia jarsalajro 1926	6210.—
Venditaj ne plu uzitaj objektoj . .	65.—
Sume	6275.—

Elspezoj:

		sv. fr.
Nutraĵoj		2089.—
Vestaĵoj, ŝuoj ktp.		561.50
Lupago por triĉambra loĝejo . . .		1120.—
Mebloj, loĝejŝanĝo		620.—
Hejtado k. lumigado		267.—
Purigado, lavado		76.—
Korpoflegado (kuracisto, razisto) .		157.—
Instruado (gazetoj, libroj)		118.50
Libertempo (vojaĝoj, amuzoj) . . .		90.—
Trafiko (poŝto, tramvojo, biciklo) .		123.—
Impostoj		202.—
Asekuroj:		
a) 5% de salajro deviga pago al pensiokaso	fr. 280.—	
b) vivasekuro de mi k. ambaŭ filinoj (9000 fr.)	fr. 325.—	
c) malsanasekuro de la tuta familio . . .	fr. 84.—	
ĉ) aliaj	fr. 35.—	724.—
Kotizoj		52.—
Diversaĵoj		75.—
Suma elsp.		6275.—

Por:	konstante fr.	*mi devas labori* tagojn	hor.	minut.
Monata lupago por loĝejo	93.—	5	3	8
Kompleta vesto . .	150.—	8	5	30
Paro da ŝuoj . . .	30.—	1	6	
Ĉemizo (meza prezo)	14.—		6	30
Elektra lumo dum 1 monato . . .	8.—		3	40
Dumvintra sufiĉa hejtado	70.—	4		
1 litro da lakto . .	—.36			10
12 ovoj	2.20		1	
1 kg da butero . .	5.—		2	20
1 „ „ bovaĵo . .	2.80		1	18
1 „ „ bovidaĵo . .	5.—		2	20
1 „ „ porkaĵo . .	4.60		2	8
1 „ „ pano . . .	—.52			15
1 „ „ rizo . . .	—.72			20
1 „ „ terpomoj (pogrande, aŭtune)	—.14			4
1 kg da sukero . .	—.56			16
1 „ „ kafo (meza kval.)	4.40		2	
Jarabono al "S-ulo" afranko de simpla	10.—		4	40
Afranko de simpla letero eksterlanden)	—.30			8

Kelkaj rimarkoj: Estante jam en la deksesa deĵorjaro, mi atingos post 2 jaroj la maksimum de mia klaso kaj tiam havos salajron da fr. 7340, inkluzive aldonpagoj por 2 Infanoj kaj restado en urbo. La nutrado estas bona, sufiĉa, sed simpla. La nunjaraj elspezoj por nutrado estas la samaj kiel lastjare, meze fr. 175 monate. Ĝis aŭtune de 1926 j. mi okupis triĉambran loĝejon sen banejo en teretaĝo kaj pagis jare fr. 1120. Nun mi havas belan sunriĉan kvarĉambran loĝejon en dua etaĝo (ĉe loĝejkooperativo, kies membro mi estas) kun banejo, varmakvoaparato kaj interna teraso kaj pagas jare fr. 1512. La sama loĝejo ĉe privata posedanto kostus 3—400 fr. pli. Tian lukson de belega loĝejo mi povas permesi al mi estante "nefumanto" kaj ĉar mi preskaŭ nenion elspezas je la profito de l' alkoholkapitalo. Pro la loĝejŝanĝo mi havis kelkcentojn da eksterordinaraj elspezoj. De nun mi povos ankaŭ iomete ŝpari por pagi ŝuldojn al miaj gepatroj.

Dojĉle (3477).

Rimarkoj de Intelektulo

Tago el mia vivo? Senlaborulo? Kaj kion, se intelektulo?

Preskaŭ la tutan nunan jaron mi ĉiam kun plej progresema intereso sekvas tiajn superskribojn, titolojn. Ĉu signifas tia guto ion por la tutaĵo, por la homaro proleta — ĉu plendoj de kelkiuloj ion valoras? K-do 4320 kaj aliaj, skribintoj antaŭ vi — ĉu el Ĉeĥoslovakio aŭ el alia lando aŭ ŝtato — ĉu vi vere pensas, ke nur vi aŭ via metio estas persekutata de malfavoranta "sorto?" Kvankam mi komprenas je "pli da" sopiranta junecon, celon esprimatan "plej ofte per dezirado pli konvenan kaj konforman vivadon", sed la reala vivo ne lasas sukcesigi ĉiujn klopodojn, penojn tuj . . . Do, nur persista laboro venigas feliĉan celakiron.

Mi scias, ke ni ĉiuj estas premataj de kapitalismo, aŭ de aliaj ismoj samforte — sed diru, ĉu ni ne estas tre ofte mem kulpaj? Mi scias, ke ne estas laŭdinde, se "nombro da senlaboruloj en nia respubliko t. e. nombro da labordeziruloj de laborperejoj okupon ne akirintaj, ĉe la fino de monato julio 1927 atingis 39 839 (fine de junio — 45 460). Nombro da okupitaj lokoj ĉe la fino de julio atingis 15 653 (ĉe la fino de junio — 13 775). Nombro da subtenitaj personoj pere de fakorganizoj la lastan tagon de monato julio estis, laŭ antaŭe eksciiĝitaj raportoj, 11 872 (en junio — 13 833)". Sed kie estas la veraj klasbatalantoj? Ĉu vi ĉiuj serĉas lumon kaj trovante ĝin, ĉu vi disradias tiun al ĉiuj anguloj de via plej proksima najbaraĵo, ĉu vi zorgas pri tio, ke ne perdiĝu eĉ unu voĉo de iu K-do domaĝe al niaj proletaj klopodoj? Ĉu vi ĉiuj mem klaskonscie faras vian devon? Jen la sorĉbastoneto! Ĉar speciale en nia lando efektiviĝas kutime celkonsciaj penoj de klaskonsciaj kleruloj inter la malmulte kleraj eksterurbanoj, vilaĝanoj, laboristoj diversfakaj ktp. Almenaŭ mi spertis kaj spertas daŭre tion kiel instruisto.

Bedaŭrinde, ke niaj scipovoj nuntempe estas terure limigataj, kaj la spirito de nia instruado ĉelerneja estas endanĝerigata de ekleziuloj "romkatolikaj". Sed spite tio — progresema instruisto ne timas eĉ eventualan persekutadon.

Do, laboru! laboru! diligente, honeste faru vian metion, profesion — sed ne forgesu la sinklerigadon! Evitu alkoholaĵojn, kokainon, fumadon ktp., kaj preferu ĉiam liberan naturon kun freŝa aero, tra kiu piedirante legu, diskutu kun K-doj, pripensantaj same kiel vi aktualajn temojn de vera, ne falsigita vivo! Mi pensas, ke nur tiam ni povos alproksimigi la venkon de nia sankta afero.

I. R. M. (7616), lernejestro.

NUR INTELIGENTAJ PERSONOJ LEGAS "S-ULO"-N. NUR KLASKONSCIAJ LABORISTOJ ABONAS ĜIN.

TRA ESPERANTIO

EL LA REDAKTEJO

KION NI DEZIRAS

M a l l o n g a j , originalaj artikoloj pri lab. kultura vivo, pri moroj kaj kutimoj en diversaj landoj, ĉe diversaj popoloj, estas ĉiam preferataj. Ni ne forgesu, ke la grava plimulto de nia legantaro ne ŝatas longajn artikolojn.

Kliŝoj taŭgaj estas ankaŭ akceptataj, sed atentu, ke la financa situacio de "S-ulo" ne premesas loki multajn bildojn en la sama n-o. Ni mem tre dezirus vidi tiajn, samkiel preskaŭ la tuta legantaro. Por ebligi tion, ĉiuj devas klopodi por pligrandigi la abonantaron. Do, varbu kaj varbigu por SAT, por "S-ulo", por niaj eldonaĵoj.

Uzu ĉiam nur oficialigitajn esperantajn vortojn. Kontrolu pro tio en la "Oficiala Klasika Libro" (mendebla ĉe la administracio) antaŭ ol sendi vian manuskripton. Evitu naciisman uzon de vortoj kiel "r e s p e k t i v e", "i n c i d e n t e", "h a v i d i f e r e n c o j n k u n i u" ... anstataŭ: aŭ, okaze, malpaci, malkonsenti k. s.

Fine, denove ni ripetas: S k r i b u ĉ i a m n u r s u r u n u f l a n k o d e l' p a p e r o ! S k r i b u k l a r e , l a ŭ e b l e s k r i b m a ŝ i n e , a l m e n a ŭ p e r i n k o ! L a s u s u f i ĉ e d a s p a c o i n t e r l a l i n i o j ! Kaj gardu kopion, ĉar la SAT-kaso ne permesas resendi manuskriptojn. I. H. K., Red.

DISKUTEJO

Pri neegaleco en Sovetio!

Oni tre ofte miras kial la plej favoraj cirkonstancoj ekzistas en Sovetio nur por laboristoj, sed ne por ĉiuj laboruloj egale: laboristoj, oficistoj kaj kamparanoj. Tamen la kialoj estas tre simplaj. Soveta Respubliko estas ankoraŭ tre juna ŝtato. Nur 10 jarojn travivis ĝi, kaj jarojn la plej malfacilajn. Post ekstera kaj interna militoj ĝi ricevis tute detruitan mastrumaĵon. Apud ĝiaj landlimoj staris kaj staras tre obstinaj malamikoj. Tamen malgraŭ ĉio ĝi forigis ĉiujn signojn de detruoj kaj komencis grandegan laboron por konstruado de nova Sociordo — Socialismo. Multajn fortojn postulas tia laboro, ĉiu monereto estas multekosta kaj tial Soveta Respubliko tuj ne povas kontentigi ĉiujn bezonojn de siaj regnanoj. Je unua vico ĝi kontentigas tiujn, kiuj pli multe donas al komuna konstruado, t. e. laboristoj. Kamparano donas nur malgrandan parton de sia laboro al la Respubliko per impostoj, kaj la restaĵon li uzas por kontentigo de siaj bezonoj, ĉar lia mastrumaĵo estas ne tre produktema. Kontraŭe, laboristo per salajro ricevas nur parton el la rezultoj de sia laboro kaj la pli grandan parton fordonas al la Respubliko. Laboristo staras en unuaj vicoj de batalantoj en labora kaj revolucia fronto kaj, nature, la Respubliko pli multe donas al tiu, kiu pli multe donas al ĝi.

Kaj aliaj regnanoj devas memori, ke tia situacio estas ne por ĉiam kaj devas ne murmuri, sed per ĉiuj fortoj helpi al la Respubliko en ĝia laboro por konstruado de nova, pli bona Sociordo, kie ĉiu laboros laŭ siaj fortoj kaj ricevados laŭ siaj bezonoj.

Oficisto *Baranov* — Rostov-Don.

El la sukcesoj de esperanto

Konferenco de metiaj unuiĝaj delegitoj okazis sub la aŭspicioj de la Manchester'a Laborista Esperanto-Klubo k. la Nacia Unuiĝo de Laboristaj Kolegioj ĉe la Caxton Hall, Salford, sabate, la 24-an de septembro. Tridek organizoj sendis deligitojn, k. espistaj vizitantoj el diversaj lokoj ankaŭ ĉeestis.

Prezidis la Urb-konsilanto George Hall, K-do Frank Elder (4303) legis fratecajn salutojn de K-doj el diversaj landoj. K-dino May Dunn (4709) alparolis la virinojn k. diris, ke al la delegitoj plaĉas aŭdi, ke tiu ĉi konferenco ricevos tutmondan publikigadon k. tutmondaj K-doj ĝojos aŭdante pri ĝia sukceso per la SAT-ĵurnalo.

La paroladisto, K-do *Mark Starr*, per cito de trafe elektitaj faktoj k. konvenaj argumentoj pledis por nia afero. Interalie li montris ĵurnalon el la malproksima (?!) oriento, kiu provas unuigi la Balkajn (?!)[1] popolojn, k., kvankam naŭ lingvoj estas uzitaj en tiu ĉi ĵurnalo, oni ne konsideras la anglan lingvon de sufiĉa graveco por uzi ĝin. Tial eraras tiuj, kiuj kredas, ke la angla lingvo fariĝos la tutmonda.

Rezolucio estis proponita de la deligitaro per K-do Shaw, reprezentanto de la Unuiĝo de Butik-laboristoj. K-do Dean de la Unuiĝo de Asekur-laboristoj subtenis ĝin, k. ĝi estis unuanime kaj entuziasmege aprobita:

"Tiu ĉi delegita Konferenco de organizitaj laboristoj promesas raporti al siaj respektivaj organizoj pri la graveco de la helpa lingvo esperanto, kiel interkomunikiĝilo ĉe la tutmondaj laboristoj, k. alvokas al la organizoj reprezentataj fari ĉion eblan por subteni kaj antaŭenigi la instruadon k. uzadon de esperanto, k. profiti la kursojn jam aranĝitajn por tiu ĉi temo de la Nacia Konsilantaro de Laboristaj Kolegioj, k. ankaŭ urĝas fari premon ĉe la aŭtoritatuloj de Edukado, por ke ĉi tiuj enmetu esperanton en la lernprogramon de la lernejoj."

Post la Konferenco, la klubanoj iris al la Esperanto Laborista Kluba ĉambro ĉe 114 Duke Street, Hulme, Manchester por temanĝo. Post la temanĝo, K-do Starr donis interesan paroladon pri la SAT-Kongreso en Lyon.

4710.

*

TRA LA MOVADO

(Kroniko)

Aŭstrio. Lab. Esp. Grupo en *Salzburg* organizis esp.-ekspozicion en la Lb. Hejmo. — **Belgio.** Ĉe la tramlaboristoj en *Bruxelles* funkciis 2 kursoj kun 45 lernantoj. Poste la iniciatinto de la kursoj, K-do Lebacq ekkorespondis kun 16 diverslandaj kolegoj k. per la taŭgaj korespondaĵoj daŭre stimulis la lernemon de siaj K-doj. Li ankaŭ regule ekspozicias la ricevitaĵojn kun traduko en franca k. flandra. En koridoro de "La Sindikata Domo" pendas murgazeto, vekanta tiom da intereso, ke oni ne kapablas respondi al ĉiuj petoj pri kurso. La esp. sekcio de la tramlab. sindikato kalkulas 30 anojn k. vigle vivas. K-do Van Aelst paroladis pri esp-o k. proletoj en 4 lab. organizoj. La esp. grupo aranĝis sukcesplenan vesperfeston. Sekvis 3 novaj kursoj kun 35 p. La kurso per korespondado gajnis 10 novajn lernantojn. Dufoje monate oni priparolas libere elektitan temon. — En *Elouges* k. *Wasmes* K-do Harmand gvidas kursojn. — **Francio.** En *Parizo* nun funkcias 9 esp. kursoj publikaj k. senpagaj, organizitaj de la Esp. Lab. Grupo, krom la konstanta kurso por korespondo. En la lasta lunda kunveno ĉe la Laborborso nia K-do Christensen el Ĉikago paroladis pri siaj peresp-aj vojaĝoj tra Sovetio k. aliaj eŭropaj landoj, konkludante, ke "ne estas necese lerni, sed uzi esp-on". — **Germanio.** Sukcesa esp. propagando en *Mittweida.* Kurso kun 12 p. komenciĝis. — **Nederlando.** En *Amsterdam* oni ne bezonis fari ian "propagandan" laboron k. denove povis organizi nombron da kursoj, provizore nur 8. La tiea Grupo fariĝas ĉiam pli konata — el tre diversaj flankoj oni petis al ĝi organizi kursojn specialajn por la venonta vintro. — En *Leiden* la SAT-anoj venontan vintron ĉiuĵaŭde vespere kunvenos en la Popoldomo, salono 4, Heerengracht. Tie ili pritraktos en esp-o ian temon, k. la reston de l' vespero pasigos per tradukado, interparolado ktp. — **Sovetio.** La esp.-ĉelo de PTT-laboristoj en *Leningrad* aranĝis dusemajnan ekspozicion kun plena sukceso. Nun ĝi estas translokigita en la Ŝtata poŝt-telegrafa Muzeo.

[1]) Verŝajne nia K-do volis diri *proksima* k. *Balkanajn.* *Red.*

*

NIA POŜTO

265. — Via agiteca alvoko taŭgas por viaj nacilingvaj gazetoj, ne por "S-ulo".

8900. — Via artikolo "Unu horon en Franzensbad" jam aperis en n-o 156. — Ni ne konsentas enkonduki laŭdan rubrikon en "S-ulo"; ni ne imitu la neŭtralulojn tiurilate. — Estas vere, ke ni estas informitaj pri la speciala deĵoro de la de vi menciita K-do. — Pri elekto de verkoj ekzistas ĉe SAT Lit. Komisiono. Al ĝi okaze sendu vian "dramon". Via "Tago" aperos siavice. La ricevita foto ne taŭgas por ricevi bonan kliŝon. *E L.*

693 k. a. — Ni rediras, ke anoncojn aŭ informojn kun anonca karaktero ni ne povas publikigi senpage.

6727. — En la komenco de la Oficiala Klasika Libro mem estas klarigite, ke la signitaj per komenca ĉeflitero radikoj estas tiuj de l' Fundamento! *Red.*

*

MEMORNOTO

Represis el "Sennaciulo":

Martakoĉ (armena, Alvoko al batalo), Tiflis, n-o 222 (1382): Lastaj leteroj de Sacco k. Vanzetti. — *Väst-Svenska Kuriren,* Göteborg, 5. 10. 27: Germanio super ĉio. — *Strahdneeku Awise,* Leepajâ, 5. 10. 27: Lastaj leteroj de Sacco; 7. 10. 27: Jugoslavio — lando, kie oni mortas pro malsato. — *Atpŭtai,* Leepajâ, n-o 281: El sendependa Turkio.


La gazeto de la juna generacio

Esperanto-Junularo

Universala Instruilo kaj Praktikilo

Abonprezo: jara por 8 numeroj: 8 leterafrankoj al eksterlando (= 8 respondkup.) = 1 Sm 0,48 us. dol., 2 Rm., 2,50 sv. fr., 2 ŝil. Oni povas aboni kvaronjare.

Anoncprezo: Anonceto de 10 vortoj (krom unu adreso) 2 leterafrankoj al eksterlando.

Redaktejo kaj administrejo:

A. Neupert, Wedellstrasse 17
Leipzig N 23 (Germ.)

Enhavis priesperantajn artikolojn aŭ notojn:

Elternhaus und Schule, Wien, okt. 27. — *Salzburger Wacht,* okt. 27. — *Strahdneeku Awise,* Leepajâ, 8. 10. 27.

Enmetis enesperantajn artikolojn:

ISK, Schlüchtern, Germ., okt. 1927: Esperanto en popollernejojn!



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

A Worker looks at History (Laboristo rigardas en la Historion) de *M. Starr.* Dua, revizita eldono. Eldonejo: *Plebs League,* 162-a, Buckingham Palace Rd. London, S. W. 1. Formato: 18×12 cm., 140 pĝ. Prezo: 1 ŝil. 6 pencoj.

Domaĝe, ke loko mankas por recenzi nacilingvajn eldonaĵojn; almenaŭ ni gratulu la aŭtoron, kiu inter aliaj verkoj ne forgesis citi "S-ulon", kiel fonton el kiu li ĉerpis materialon. Ĉiu anglalingvano mendu la libron.

Literatura Informilo de la Esperanto-fako ĉe la eldonejo Ferdinand Hirt & Sohn en Leipzig, n-o 4, somero 1927; *Esperanto Wörterbücher, Esperanto Lehr- und Lesebücher,* de la sama eldonejo. Formato: 24×16½ cm. Senpage riceveblaj.

Krom pensiga, iom revolucia ĉefartikolo "Post kvardek jaroj" k. listo kun specimenaj paĝoj de la eldonaĵoj de tiu firmo, estas donitaj ankaŭ la statutoj de la Esp.-Instituto por la Germ. Respubliko.

ONI PLENDAS

K-do Wilhelm Wappler (2394) el Mittweida, Saksio, pri nericevo de respondoj el Sovetio. "Kun Rusio mi ĝis nun spertis, ke oni tie volontege akceptas detalajn leterojn, sed rekompenci per samaj leteroj oni tute ne estimas necesa. Aŭ ĉu eble ili ne rajtas?"

Ni ree avertas ĉiujn K-dojn k. Grupojn, kiuj anoncis korespondadon aŭ interŝanĝadon ktp., ke estas ilia *devo* respondi aŭ almenaŭ klarigi la aferon. Alimaniere oni perdas la emon kaj fidon pri korespondado. *Red.*

NEKROLOGO

Kun sincera malĝojo ni informas la membraron de SAT pri la morto de nia altestimata K-do

Josef Brauhart,

eksoficisto, kies vivo estingiĝis la 7. okt., kaŭze de la proleta malsano.

Kvankam de kelkaj jaroj katenita al sia loĝejo, li tamen estis unu el la plej perfektaj esp-istoj k. modela SAT-ano. La kremacia (bruliga) asocio "Flamo" prizorgis la cindrigon de lia kadavro.

Honoron al lia memoro!

La funebrantaj SAT-anoj de Salzburg-Aŭstrio.

KOREKTO KAJ ATENTIGO. — Kiel multe ni dezirus ŝpari la jenan lokon, evitante ĉi "rubrikon". Sed kvazaŭ iu neŭtrala diablo persekutas la lingvan perfektecon de nia gazeto. Jen ankaŭ en la lastaj n-oj enŝoviĝis kelkaj eraroj, eĉ manko de tuta frazo. Nun ni esploras la aferon por scii, kie perdiĝis tiu frazo kaj kiu kulpas pri tio. Do, la plej gravaj korektindaĵoj:

En n-o 159, pĝ. 17, kol. III, lin. 4, anst. ĝiaj, legu siaj; pĝ. 18, k. II, l. 16, anst. donis, legu *juris;* pĝ. 19. k. I, l. 35, forigu la vortparton strik-; k. III, l. 5 de malsupre, forigu la fincitilojn; pĝ. 20, k. I, ĉie legu *analfabetoj;* l. 35, forigu *ajn;* k. II, l. 34, post tero metu komon; k. III, l. 12, forigu *vi,* legu *tion* anst. ĝin; l. 47, antaŭ transiras metu *li;* pĝ. 21, k. II, l. 12, legu *senhalte;* pĝ. 22, k. I. l. 18, legu edziĝu; k. II, l. 18, post 20 miloj metu *(?);* pĝ. 23, k. I, de malsupre: l. 2, legu senĉapeliĝo, l. 4, legu atentegi, l. 21, legu ĝiaj; k. II, de malsupre: l. 7, legu *eduk- kaj tendenc-esenco;* de supre l. 20, legu *"mifrati";* pĝ. 24 sub Recenzejo, k. I, l. 8, aldonu: *(por SAT-anoj duonpreze).*

En n-o 158, pĝ. 11, kol. I, l. 37, *mankas* la jenaj vortoj post Nuntempe: kun sincera bedaŭro pri lia morto, la ĉinoj havas la deziron sekvi konforme je lia profetaĵo la vojon al heligo kaj prosperigo por. Sama pĝ., k. II, l. 15 kaj 16, forigu la vortojn *ke* kaj *daŭrigi.* Krome, en la *Senn. Stud. Paĝo,* k. I, en la komenco de la artikolo "Studentaro en Hispanio" estas ia stranga fuŝaĵo. Sama kolono,, l. 9 de malsupre, la vortojn *kiel hejminstruistoj* metu post *laboras:* k. II, l. 31, post Hispanio metu dupunkton.

Nature, ĉiam okazas, ke enŝoviĝas eraretoj, kiuj ne aliigas la sencon. Tiujn, memkompreneble, ni ne korektas, ĉar tion povas fari la legantoj mem. Estontece ni zorgos, kiel eble plej malmulte kaŭzi al ili tian "gimnastikon", kvankam ni ne povas mem korekti kaj revizi la presprovaĵojn. Red.

En germanlingvaj regionoj loĝantaj kaj germanlingvon uzantaĵ K-doj mendu

lernolibrojn, vortarojn, propagandilojn

por Esperanto kaj ĉion al Esperanto rilatantan ĉe la

Laborista-Esperanto-Asocio por la germanlingvaj regionoj
Wasastraße 16, Leipzig C 1.

Ni rekomendas interalie:

LERNOLIBROJ:

	mk. germ.
Esperanto-Unterricht nach grammatikalischer Lehrmethode (Deubler)	1.50
Esperanto-Unterricht nach neuzeitlicher Lehrmethode . . (Puff)	1.50
Esperanto-Lehrbuch und vollst. Grammatik von F.C. Richter	1,—

FLUGFOLIOJ:

Einführung in die Welthilfssprache „Esperanto“	100	pecoj	= 1.00
An die Mitglieder aller prolet. Kampfes- und Kulturorganis.	100	„	= 1.00
An alle dem Arbeiter-Sportkartell angeschloss. Vereine	100	„	= 1.00
Die internationale Sprache des Radio	100	„	= 1.00
Flugblatt gegen Ido	100	„	= 1.00
Anklebezettel	100	„	= 0.40

AFIŜOJ:

LEA-Plakat, Globus mit Mann	1	peco	= 0,30
LEA-Plakat, 40 Jahre Esperanto	1	„	= 0,15
LEA Kantaro	1	„	= 0,40

Ĉiu SAT-ano estu santempe LEA-ano!

Jus aperis:

Humor' de l' mondo en Esperanto

de D-ro **Emil Pfeffer**

La ŝerco, sprito kaj anekdoto de diversaj popoloj en Esperanto kun akompanata germana teksto kaj lingvaj klarigoj. **96 paĝoj — Prezo 0,50 mk. germ.**

De la sama aŭtoro:

	mk. germ.
Esperanto en 10 lecionoj (lernolibro por germanoj)	0.25
Unua Esperanta legolibro por komencantoj kaj kursoj	0.25
Vortaro Esperanta-Germana	0.25
Vortaro Germana-Esperanta (30 000 tradukoj)	1.—
Ĉu vi parolas Esperante? (Enkonduko en la esperantan konversacion)	0.25
Esperanta Komerca Korespondo	0.50

Postulu senpagan prospekton kun prov-paĝoj de

Administracio de SAT, R. Lerchner, Leipzig O. 27, Colmstr. 1.

Poŝtĉek-Konto 6835.

ATENTU!

Organizoj kaj apartaj korespondemuloj estas invitataj koresp. kun Redakcio de loka gazeto. — Skribu pri lab. vivo.

Adr.:

Redakcio "Voronejskaja Kommuna",
Voronej, (USSR.).

SAT-anoj ne pruntedonu vian Jarlibron al kiu ajn. Ĉiam postulu, ke servopetanto montru sian membro-karton. Gardu vin kontraŭ profitemuloj kaj parazitoj!

ENHAVO:

Pri Hindio, de I. H. K.	pĝ.	33
Internaciaj sindikataj Problemoj, de A. Scheel	„	34
El Usono, de 1306	„	34
Hungaria Proletaro funebras, de 8740	„	35
Laborista Radio-amatora movado en Nederlando, de 670	„	35
Plu pri Suda Afriko, de 488	„	36
Faktoj kaj komentoj	„	36—37
Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo, E. Lanty	„	36—37
Tago el mia Vivo, de 7714	„	37—38
Mia buĝeto, de Dojĉle	„	38
Rimarkoj de Intelektulo, de I. R. M.	„	38
Tra Esperantio	„	39—40
Anoncoj	„	40

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)